
KONGRESA KURIERO

# DRAKO DE BRNO

3


2025-07-28

de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno 26 julio – 2 aŭgusto 2025



## Inaŭguro de la kongreso

La 27-an de julio 2025 la kongresanoj kolektiĝis en la Salono Zamenhof je la deka horo.



UEA-prezidanto Duncan Charters prezentis gastojn (diplomatojn) kaj podianojn. Kelkaj el ili salutis la kongreson nome de organizoj, en kiuj ili laboras. Estis prezentitaj novaj estraranoj de UEA kaj dek novaj Honoraj Membroj de UEA.




Nova UEA-prezidanto fariĝis **Fernando Maja jr,** vicprezidantoj **Seán Ó Riain** kaj **So Jinsu**, ĝenerala sekretario **Aleks Kadar**, komitatanoj **Gong Xiaofeng**, **Zdravka Bojĉeva**, **Miora Raveloharison**, **Jeremie Sabiyumva** kaj **Francois Lo Jacomo**.

Anstataŭ asociaj salutoj oni legis alfabete unuopajn landojn kaj la homoj de tiu lando ekstaris kaj svingis la manojn. La programon riĉigis muzikaĵo de Antonín Dvořák en interpreto de duo ĴeLe kaj kanto de Kajto.



La inaŭguro estis finita per la himno Espero kantata de Amira Chun.

La lasta prezidanta ago de Duncan Charters estis frazo, ke la kongreso estas malfermita.

# Ekskursoj ankoraŭ liberaj

**E2. Valtice – 84 €** marde

Kastelo kaj vinkelo de Château Valtice

**E4. Kroměříž – 64 €** vendrede

Kastelo kaj florĝardeno

**E5. Velehrad + Modrá – 92 €** ĵaŭde

Baziliko kaj subĉiela muzeo

**E6. Slavkov – 62** € marde

Batalo de tri imperiestroj

**E8. Montaro Pálava - 44 €**

Montoj, arbaroj kaj kaverno (por bonpaŝantoj)

**D2. Vilao Tugendhat** – 25 € ĵaŭde

**D3. Burgo Špilberk 18 €** marde

**D6. Muzeo de romaa kulturo 12 €** mardo

**D8. Stelobservejo – 20 €** merkrede

Merkrede 19.00-22.15

# Urbestra saluto de Herzberg

### Karaj partoprenantoj de la Universala Kongreso de Esperanto en Brno!

Estas granda plezuro kaj ankaŭ persona afero por mi sendi kelkajn bonvenajn vortojn al Brno kaj saluti vin el distanco en tiu bela urbo. La nun 110. Universala Kongreso de Esperanto estas speciala okazo por kunigi homojn el la tuta mondo por festi la potencon de internacia kompreno, amikeco kaj kunlaboro. Samtempe, mi ŝatus varme bondeziri vin kaj la Esperanto-komunumon en la 138-a datreveno de Esperanto. Feliĉan naskiĝtagon!

Tiu ĉi kongreso estu denove loko por interŝanĝo, inspiro, reciproka lernado kaj renkontejo por konatiĝi unu kun la aliaj. Uzu la tempon kune por plifortigi kaj transdoni la valorojn de Esperanto: toleremon, malfermitecon kaj pacon. Malofte ĉi tiu tasko estis tiel grava kiel hodiaŭ.

Konservu malnovajn kontaktojn kaj faru novajn. Mi deziras al vi tre interesajn konversaciojn, riĉigajn renkontojn kaj neforgeseblajn momentojn en Brno.

Varmajn salutojn el la Esperanto-urbo Herzberg am Harz

Urbestro Christopher Wagner

# Bahaa Komuno

ni ĝojas ekscii, ke la 110-a Monda Kongreso de Esperanto baldaŭ okazos en Brno. Okaze de ĉi tiu evento bonvolu akcepti niajn plej varmajn salutojn kaj gratulojn al Ĉeĥa Esperanto Asocio de la Nacia Spirita Asembleo de la Bahaanoj de Ĉeĥio. La sekretario de la Bahaa Esperanto-Ligo sendis al ni afablan inviton kune kun informoj pri la kongreso, kaj ni ĝojas, ke la sekretariino de la Nacia Asembleo ĉeestos la malferman ceremonion de la kongreso.

La Esperanto-movado estas grava por la ĉeĥa bahaa komunumo, ĉar la komencoj de la Bahaa Kredo en nia lando estas proksime ligitaj al Esperakajto. En 1926-1927, Martha Root vizitis la tiaman Ĉeĥoslovakion, kaj, interalie, prelegis pri la instruoj kaj principoj de la Bahaa Kredo (unu el kiuj estas la ideo de tutmonda helplingvo). Ĉar la viro, kiu devis interpreti por ŝi en la ĉeĥan lingvon, ne bone komprenis ŝian anglan, ŝi decidis prelegi en Esperanto kaj Vuk Echtner kaj Juliana Bendová interpretis por ŝi. Ambaŭ poste akceptis la Bahaan Kredon kaj estis tre aktivaj ne nur en la esperantista komunumo, sed ankaŭ en la emerĝanta bahaa komunumo. Bedaŭrinde, nuntempe ne estas esperantistoj en la ĉeĥa bahaa komunumo, sed la ideo pri mondlingvo ankoraŭ estas tre aktuala - ni sentas ĉi tiun bezonon pli forte ol antaŭ cent jaroj.

Zuzana Štáglová
Ĝenerala Sekretariino